

Saluton!

Ni estas du amikinoj, Laura kaj Larissa. Laura venas de Italujo kaj Larissa de Finnlando, kaj ni ambaŭ estas denaskulinoj. Ni renkontiĝis en PSI 1998 kiam ni estis 3jaraj. Ekde tiam ni sendis leterojn unu al alia. Nun ni estas preskaŭ 13jaraj kaj la lastan fojon ni renkontiĝis en PSI Aprilo 2007 en Bonn (Germanujo).

Nun somere Larissa venis al Romo kaj ŝi loĝas dum 9 tagoj en la hejmo de Laura. Ni vizitas Romon kune kaj ni ankaŭ iris al la maro apud Romo (San Feliĉe Ĉirĉeo).

Ni volas rakonti kiel ni pasigis ĉi-tiujn tagojn.

25.6.2007

Vespere alvenis la aviadilo de Larissa. Laura kaj ŝia familio iris preni ŝin. Antaŭ ol enlitiĝi ni kaj la patro de Laura ludis Monopoli.

26.6.2007

Post la tagmanĝo venis al la hejmo du amikinoj de Laura kaj, kiam ili foriris, ni iris (kun Mauro kaj Margerita, la gepatroj de Laura) viziti la centron de Romo. Antaŭe ni paŝis en la malnova parto kaj poste al Kampidoglio (en esp. Kapitolio), via Dei Fori Imperiali kaj Vittoriano. Poste ni alvenis en Placo Venecia kaj fine al Fontano de Trevi (kie ni faris ĉiun foton).



(De maldekstre) Larissa kaj Laura.

27.6.2007

Matene ni ekskursis al Vatikano. Tie ni vizitis la kastelon de Sant Angelo. Ĝi estis bela. Post tio ni iris manĝeti. Poste ni paŝis denove al Vatikano kaj Larissa aĉetis kelkajn poŝtkartojn. Kiam ni foriris de la poŝtejo, ni enviciĝis al la longa vico al Sankta Petro. Ankaŭ ĝi estis belega. Post tio ni grimpis la terurajn kaj lacigajn 320 ŝtupojn al la kupolo. (Supre belega panoramo)



Panoramo de la kupolo



Sankta Petro



Kastelo Sankta Anĝelo

28.6.2007

Ni kaj Margerita iris butikumi en Via del Corso (pron. Via del Korso), la ĉefstrato, kie estas le plej belaj kaj multekostaj butikoj de Romo. Tie ni aĉetis 2 ĉemizojn por ni kaj Larissa, donacojn por ŝiaj du gefratoj (Sofia kaj Sakari). Por la tagmanĝo ni revenis hejme. Poste ni iris fari ĉirkaŭiron de la kvartalo kaj ni aĉetis bonan glaciaĵon (en la foto).



29.6.2007

Matene ni devis vekigi frue, ĉar ni ekiris al la maro. En la aŭtomobilo Laura dormis iomete, ĉar ŝi estis laca. Larissa ne dormis, ŝi rigardis la pejzaĝojn. Ni alvenis al la domo postagmeze. La domo estis malgranda sed en la teraso estis belega panoramo!!!! Ni manĝis kaj metis niajn aĵojn. Poste ni ekiris al la strando. Tie ni naĝis kaj sunumis. Estis tre amuze!



la panoramo del la teraso



la strando

30.6.2007

Matene ni denove iris al la maro sed ĉi-foje por la tuta tago. Estis tre bele ludi, naĝi, sunumi. Ni tagmanĝis sur la strando sandviĉon kaj glaciaĵon. Postagmese ni manĝis bonan fruktosaladon. Vespere ni iris promeni tra la urbeto kaj ni vespermanĝis en picejo en la centra placo de

S. Feliçe Ĉirĉeo. Post la vespermanĝo ni vidis mallongan spektaklon de la dancistinoj de la vilaĝo.



Laura kiu sunumas



Larissa kiu sunumas



1.7.2007

Ni revenis de la belega urbeto denove al Romo. En la aŭtomobilo Laura denove dormis, sed Larissa ne. Ni aŭskultis muzikon. Kiam ni revenis ni manĝis kaj poste ni faris ĉitium verkon.

Morgaŭ ni iros al Colosseo (pron. Koloseo) kaj poste... ni vidos, ĉar ankoraŭ ni ne havas programon.

Ni esperas ke ĉitium paĝoj ne enuigis vin...

Korajn salutojn

Laura kaj Larissa